


# Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

21-a Jarkolekto \* Decembro 2004 \* N-ro 76

ISSN 1576-0618



**Kompleta  
raporto pri la  
10-a  
Andaluza  
Kongreso de  
Esperanto**

Lora del Río en Sevilo, oranĝ-arboj  
apud la rivero Gvadalkiviro

# Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.  
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto  
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)  
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.  
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ  
REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184,  
29080 MÁLAGA, [esperanto@ciudadfutura.com](mailto:esperanto@ciudadfutura.com))  
José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ  
([esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es))  
COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ,  
José Antonio VALVERDE MARTÍN, D-ro Wolfgang  
GUNTHER,  
Ángel ARQUILLOS LÓPEZ.

## ENHAVO

10-a Andaluza Kongreso de Esperanto . . . . .	3
Projekto “Esperanto en la Andaluzaj Universitatoj” . . . . .	12
La Trezoro de Karambolo . . . . .	14
Pri Lingvistiko . . . . .	16
Andaluza Literaturo . . . . .	18
Judaj Ŝpuroj en Jaeno . . . . .	21
Paĝoj pri Nia Historio . . . . .	22
Informoj pri la 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto . . . . .	23
Flamenko . . . . .	24
Poezia Angulo . . . . .	26
Andaluza Kuirarto . . . . .	27
Turismi en Lora del Río . . . . .	28
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio . . . . .	30
Fakaj Asocioj . . . . .	31
Lasta Paĝo . . . . .	34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.  
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

## **10-a Andaluza Kongreso de Esperanto**

**Seviljo, 31-an okt. / 1-an nov. 2004**

La unuaj konversacioj pridiskutantaj la organizadon de nova kongreso de Esperanto en Andaluzio okazis dum renkontiĝo de Sevilja Esperanto-Asocio en la somero de 2004. Tiam, José María Rodríguez, kordova samideano, lanĉis la ideon reorganizi tiujn renkontiĝojn kiujn oni ĉesis okazigi komence de la 90-a jardeko. La seviljaj esperantistoj José Roldán, Manuel Ortega kaj Antonio Rodríguez akceptis la proponon kaj ekde tiu momento ili eklaboris por la organizado de la okazonta 10-a Andaluza Kongreso de Esperanto.

Unuamomente oni proponis kelkajn festo-tagojn de la monato oktobro, sed pro diversaj kialoj ĉi tiu dato prokrastiĝis definitive ĝis la fino de la monato oktobro kaj la unua tago de novembro. La organizantoj revis pri 20 aŭ eĉ 30 gepartoprenantoj, la surprizo estis tre agrabla kiam ekvenis la aliĝoj de multaj pliaj personoj de preskaŭ ĉiuj provincoj de Andaluzio.



(Maldekstre-dekstren)


Antonio Rodríguez, Ramón Castejón, José Roldán kaj Manuel Ortega.

La ĉefaj organizantoj de la Kongreso

## 31an de oktobro.-

La Sevilja Grupo preparis lerte la kongresejon. Ĝi troviĝis en la Municipa kaj Kultura Centro “Las Sirenas” en la makarena kvartalo, ĝuste en la centra parto de la urbo. La enirejo aperis ornamita de blankverda andaluza standardo kaj verda stelo anoncanta la 10-an Andaluzan Kongreson de Esperanto. La unuaj gepartoprenantoj alvenis ekde la 10-a horo matene. Ili tuj ricevis la kongresmaterialon, tio estis dokumentujo enhavantan la kongreslibron, la lastan ekzempleron de *Gazeto Andaluzia*, la libron de Antonio Valén “Esperanto, Lengua y Cultura”, turisman informon pri la Reĝaj Alkazaroj de Seviljo kaj diversajn E-propagandilojn. Venis 70 personoj de Seviljo, Malago, Kordovo, Jaeno, Onubo, Granada, Jerezo, Ekstremaduro, Madrido kaj eĉ brito kiu feriiis en la malaga Suna Marbordo.

La unua akto estis la legado de mesaĝo de la Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kiu ne povis veni en la Kongreson akurate, kaj poste sin prezentis la reprezentantoj de la lokaj grupoj. Manuel Ortega salutis nome de la Sevilja Grupo, Julio Herrero nome de Malago, José María Rodríguez nome de Kordovo, Pablo Foche de Jaeno kaj Victor Manuel Macías de Onubo, ankaŭ salutis la eksterlanda partoprenanto, temis pri bona ŝanco konstanti, ke estas eble kompreni perfekte eksterlandanon parolanta esperanton, eĉ post studi la lingvon nur pere de interreto aŭ per libro-metodo.



Pablo Foche, reprezentanto de Jaena Esperanto-Asocio salutas la partoprenantojn en la 10-a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Apud li Eduardo González, de la Organiza Komitato de la Kongreso.



Victor Manuel Macías Caro, de la Onuba Esperanto-Asocio salutas la kongreson. Unuafoje asocioj de Jaeno kaj Onubo æestis oficiale la Andaluzan Kongreson de Esperanto.

La unua prelego temis pri “Esperanto Hodiaŭ”. La preleganto Antonio Rodríguez Gasch, konata sevilja esperantisto, parolis abunde pri kio estas Esperanto en la nuntempa socio kaj la rolo kiu la internaci-lingva movado devas roli ĉi-momente. Poste José María Rodríguez prezentis la verkaĵon “Gran Diccionario Español-Esperanto”, ekzemplero de ĉi tiu libro estus poste donacita al la Publika Biblioteko de Seviljo .



Kunvenejo de la 10-a Andaluza Kongreso de Esperanto kie okazis la diversaj prelegoj.

La dua prelego temis pri "Esperanto kaj Interreto". La preleganto estis Manuel Ortega, juna sevilja samideano, konanta perfekte ambaŭ mondojn, tio estas Esperanto kaj la informadika reto, kiel li trovis kaj lernis antaŭ unu jaro la internacian lingvon.

Tagmeze ĉiuj gepartoprenantoj manĝis kune en apuda restoracio. La geesperantistoj plenumis la manĝejon kaj tiu estis la plej taŭga momento por interkonatiĝi ĉar feliĉe aperis novaj vizaĝoj en la andaluzia Esperanto-movado, temas pri aŭskultindaj gesamideanoj kiuj tutcerte devas roli efike en la movado. La manĝado, kaj la posta kafumado, estis bona momento por memori ne-ĉeestantajn personojn sen kies laboro la movado en Andaluzio ne ekzistus nuntempe en Andaluzio.

Vespere okazis publika debato pri la situacio de Esperanto en Andaluzio. José María Rodríguez gvidis diskutadon inter la ĉeestantoj pri diversaj aferoj, inter ili:

a) Instruado de Esperanto: post informi pri ĉiuj kursoj organizitaj en Andaluzio dum la pasinta jaro, oni pridiskutis la aferon organizi kursojn en la andaluzaj universitatoj. Miguel Angel Romero, profesoro pri la turka lingvo en la Sevilja Universitato, sciigis al ĉiuj kiamanere oni povus peti al la universitataj aŭtoritatoj organizi kursojn pri la internacia lingvo kun oficiala agnosko. Espereble almenaŭ en la universitatoj de Malago kaj Seviljo oni petos la organizadon de ĉi tiu kurso en venontaj jaroj.

b) Esperanto-Publikaĵoj en Andaluzio: oni studis la nuntempan situacion de la esperanto-publikaĵoj en Andaluzio, kaj ĉefe pri *Gazeto Andaluzia*, *Monate ĉe Vi* kaj *Opiniaro*. Ĝenerale la opinioj estis favoraj kaj la ekzisto kaj daŭrigo de ĉi tiuj publikaĵoj estas certigita.



Komuna manĝado en la unua tago de la Andaluzia Kongreso

c) La tria pritraktita temo temis pri kiamaniere altiri la atenton de ĉiuj geesperantistoj de Andaluzio kaj tiel kreskigi la nombron de membroj en la esperanto-asocioj de Andaluzio. Oni decidis, ke la pago de la diversaj kotizoj: loka/andaluza/hispana/universala devas kaŭzi neniun problemon aŭ esti preteksto por ne aliĝi al diversaj asocioj. Tiel ekde nun, aparteni kaj pagi kotizon al loka aŭ al la andaluza E-asocio signifos aŭtomate, se la membro ne kontraŭopinas, aparteni al la alia asocio.

ĉ) Nova afero pritraktita estis la kunlaboro inter la lokaj grupoj kaj la andaluza unuiĝo. Oni decidis, ke la laboro en la disvastigo de la internacia lingvo en konkreta urbo devas esti plenumita de la loka asocio ekzistanta en tiu urbo. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo devas promocii la lingvon en tiuj lokoj kie ne ekzistas grupo kaj ĝenerale helpi al la grupoj jam ekzistantaj.

d) Oni studis poste la diversajn agad-programojn en kiuj laboras AEU, inter ili la rilatoj kun sindikatoj kaj partioj. Oni menciis la leterojn senditaj pasint-jare al ĉiuj partioj kiuj prezentis siajn kandidatojn al la Eŭropa Parlamento. Rilate la programon “Esperanto en Bibliotekoj” oni sciigis al la ĉeestantoj, ke dum la pasinta jaro oni sendis libro-metodojn de esperanto al publikaj bibliotekoj de la malaga provinco. Oni informis ankaŭ, ke ĉi tiu programo daŭriĝos dum la jaro 2005 pere de la sendado de libroj al la publikaj bibliotekoj de Almerio.

e) Fina punkto estis la prezento de la programo “Helpo al UEA-delegitoj en Andaluzio”. Oni informis pri la konkretaj mon-helpoj al tiuj personoj kiuj deziras aliĝi al Universala Esperanto-Asocio kaj fariĝi membro en siaj urboj. Kelkaj ĉeestantoj montris sin favoraj al la ideo kaj sendube dum la venontaj jaroj la nombro de ĉi tiuj delegitoj en Andaluzio kreskos.

Post ĉi tiu interesa intersanĝo de opinioj de la ĉeestantoj, kiuj celis favorigi la disvastigon de la internacia lingvo en Andaluzio, okazis nova prelego. Ĉi-foje nia onuba samideano Victor Manuel Macías Caro parolis pri “Timoj kaj kontraŭaj opinioj rilate Esperanton”. La juna preleganto bazu sian paroladon sur la fama artikolo de Claude Piron “Psikologiaj reagoj al Esperanto” kaj li prezentis kaj klasifikis la kontraŭajn opiniojn ekzistantaj rilate la internacian lingvon. Vere interesa prelego ĉar estas bone koni la opiniojn de tiuj kiuj kritikis kaj ofte mokas pri nia laboro en la disvastigo de Esperanto.

La lasta oficiala akto de ĉi tiu unua tago estis la okazigo de la ekzamenoj, elementa kaj meza niveloj. Prezentiĝis al la elementa ekzameno kaj aprobis jenaj samideanoj:

Antonio Fabián Jiménez Jiménez  
Jordi Lietor López  
Francisco J. Martín Gómez  
Eduardo Pérez Navarro

Carlos Alberto Juan Moreno  
Victor M. Macías Caro  
Rafael Mateos González

Prezentiĝis al la meza ekzameno kaj ankaŭ atingis la diplomon:

Antonio Fabián Jiménez Jiménez  
Victor Manuel Macías Caro  
Rafael Mateos González

Jordi Lietor López  
Francisco J. Martín Gómez  
Eduardo Pérez Navarro



Disdonado de diplomoj de la ekamenoj elementa kaj nivela.



La unua tago de la Kongreso finiĝis tiam, poste kelkaj gepartoprenantoj decidis diboĉi dum la sevilja nokto.... sed kompreneble tiu estas alia historio.



## **10-a Andaluza Kongreso de Esperanto Seviljo, 31-an okt. / 1-an nov. 2004**

La kongreso daŭriĝis lunde matene. Okazis tiam la prelego de Juan de Dios Montoto pri la temo “Blas Infante, Andalucismo y Esperanto”, ne estis la unua fojo en kiu Juan de Dios Montoto parolas pri la patro de la andaluza patrujo kaj la internacia lingvo. Li jam prelegis pri ĉi tiu sama temo kaj ne nur ĉe esperanto-renkontiĝoj sed ankaŭ okaze de akto pri Blas Infante. Tiel la ĉapitro en kiu Enrique Iñiesta parolas pri esperanto en la biografio de Blas Infante “*Blas Infante, toda su verdad*” (Volumo 2-a Granada 203), baziĝas en la esplorado de Montoto.



Juan de Dios MONTOTO  
ricevas atestilon post sia  
altvalora prelego

Post la prelego okazis la disdonado de atestiloj kaj diplomoj. Atestiloj por la prelegantoj, dank'al ili ĉi tiu renkontiĝo atingis sufiĉe altan kultur-nivelon, kaj diplomojn por tiuj kiuj superis la ekzamenojn, ĉu baza ĉu meza, pri esperanto-kono, tio ja garantias, ke esperanto havas estontecon en Andaluzio.

La Kongreso finiĝis pere de la legado de la konkludoj fare de José Roldán León, ĉefa respondeculo de la organizado de la Kongreso. Oficiala fina foto de la gepartoprenantoj ĉe la pordego de la kultura centro “Domo de la Sirenoj” fermis la esperanto-agadojn ene de la kongresejo, kie dum la du tagoj funkciis interesa ekspozicio pri libroj en kaj pri esperanto kaj ankaŭ libro-servo, kie ne nur la geesperantistoj sed ankaŭ vizitantoj povis aĉeti ĉefe libro-metodojn de la internaci alingvo.

La Kongreso ja finiĝis per turisma vizito al la Reĝaj Alkazaroj. La gvidata turisma vizito komenciĝis je la 12-a horo kaj utilis ne nur por viziti belegan monumenton de Seviljo sed ankaŭ por interkonatigi plie la ĉeestantojn.



**Gepartoprenantoj en la 10-a Andaluza Kongreso de Esperanto  
Seviljo 31an okt. / 1an nov. 2004**




La geesperantistoj en la Reĝaj Alkazaroj de Seviljo.

Ĉu finiĝis tiam la Kongreso? Oficiale jes, sed pro la fakto ke kelkaj gepartoprenantoj deziris denove kunmanĝi oni profitis la turisman zonan vizitita por manĝi ĉe ĉina restoracio.

La malagaj ĉeestantoj profitis ĉi lastajn horojn por inviti al ĉiuj ĉeesti la 11-an Andaluzan Kongreson de Esperanto okazonta en Malago dum la jaro 2005.

## Nova albumo de TINĈJO en esperanto !!!!!

La eldonejo CASTERMAN, kun la prizorgo de la esperanto-grupoj de Lille kaj Villeneuve-d'Ascq, norde de Francio, eldonis novan volumon de la aventuroj de Tinĉjo.



La eldono fariĝas en la jaro 2005 por honorigi la internacian esperanto-renkontiĝon "Bolougne 2005" kiu memorfestas la centjariĝon de la unua Universala Kongreso de Esperanto okazinta en la jaro 1905 en la urbo Bolougne-sur-Mer.

La elektita volumo de la aventuroj de Tinĉjo estis "Tinĉjo en Tibeto" ĉar ĉi tiu albumo emfazas la toleremon, la amikecon kaj la solidarecon inter la diversnaciaj homoj.

Estas eble aĉeti ĉi tiun novan libron de la aventuroj de Tinĉjo tradukita en la internacian lingvon esperanton. La prezo estas 12 eŭroj. Kontakto kun: [esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es) aŭ rekte kun la poŝta adreso de Gazeto Andaluzia: Apartado 3142, 14080 Córdoba.



10-a Andaluza Kongreso de Esperanto

## **Projekto: Esperanto en la Andaluzaj Universitatoj**

Unu el la rezultoj de la ĵus okazinta Andaluza Kongreso de Esperanto estis la pristudo de projekto por enirigi la studon de la internacia lingvo, kun oficiala agnosko, en kiel eble plej nombraj andaluzaj universitatoj.

La Leĝo por Reformo de la Universitatoj de la jaro 1983 klasifikas la studendajn objektojn en la universitatoj jene:

- a) devigaj stud-objektoj: devigaj por ĉiuj gelernantoj en konkreta kariero.
- b) Elektblaj stud-objektoj: kiujn la gelernantoj elektas el aro da stud-objektoj proponitaj de la Universitato.
- c) Libere konfigureblaj stud-objektoj: la lernanto elektas ilin el tre ampleksa aro da kursoj, kiuj foje eĉ ne rilatas rekte a la universitata kariero.

La universitatoj de Barcelono, Basklando kaj La Laguno en la Kanaria Insularo jam ofertas al sia lernantaro la eblecon sekvi esperanto-kurson ene de la grupo “libere konfigureblaj stud-objektoj”. La Andaluza Esperanto Kongreso, kunlabore kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, pensis, ke estus bona ideo ekigi agad-planon por enirigi esperanton en la andaluzajn universitatojn, aŭ en kelkaj el ili, laŭ tiu grupo de stud-objektoj. Miguel Angel Romero, kiu instruas la turkan lingvon en la Universitato de Seviljo, informis al ĉiuj ni pri la malfacilaĵoj atingi tion, tamen li ankaŭ sciigis al ĉiuj ĉeestantoj, ke ofte la universitataj aŭtoritatoj akceptas proponojn por organizi kursojn, sen oficiala agnosko fore de tiu universitato, kun la kondiĉo ke tiu projekto kostos neniom al la universitato mem. Miguel Angel Romero klarigis, ke estus eble prezenti projekton por instrui esperanton en la universitatoj ne necese kiel stud-objekton.

Do, jen la konkreta projekto:

Estos necese trovi personojn kiuj rekte rilatas al la universitato, ekz. Profesoroj aŭ funkciuloj tie laborantaj. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ellaborus leteron kaj projekton prezentota al la universitataj aŭtoritatoj petante la okazigon de kurso pri la internacia lingvo. La projekto estus prezentita de tiu persono.

Estas necese klarigi rilate ĉi tiun projekton ke:

- la persono kiu devigas sin prezenti la projekton NENIEL devigas sin instrui la lingvon se la kurso finfine estas aprobata. Tio signifas, ke li ne necese devas

esti esperantisto, sufiĉas ke li estu favora al la ideo de la internacia lingvo esperanto.


- La kurso, se aprokata de la koncernaj instancoj de la universitato, povus esti instruta de samideano kun sufiĉaj konoj kaj liber-tempo.

Do, se vi iamaniere rilatas kun kelka universitato kaj vi akceptas prezenti projekton por instrui esperanton, kontaktu kun ni. Same, se vi havas sufiĉe liberan tempon kaj kapablecon por instrui esperanton same kontaktu kun ni.

Estus granda triumfo se, post kelkaj jaroj, en almenaŭ unu aŭ du universitatoj de Andaluzio estus eble lerni esperanton.

## MAKAKO kaj ANTONO

Jen unu el la lastaj libroj eldonitaj en Hispanio en esperanto. Temas pri infan-libro de Alfredo GÓMEZ CERDÁ, kun desegnoj de Pedro ULLATE LÓPEZ, kiu ankaŭ faris la tradukon.




La libro estas verkita por infanoj. Ĝi prezentas klaran mesaĝon per tre mallongaj tekstoj, kaj multaj, multaj amuzaj tukoloraj desegnoj. Sur la dorso de ĝia kovrilo oni legas:

“Makako kaj Antono laboras en vartrajno. Ili estas amikoj, sed ne pro tio ke ili laboras en la sama vartrajno. Ili estas malnovaj amikoj. Dum la staciestro parolis, li tiam tordis la pintojn de siaj grandaj lipharoj kaj sonigis la sonorileton de la kajo. Tint-tint-tint ! Kaj kiajn taskojn li postulis !

Makako kaj Antono akceptis ĉiun taskon. Ili ĉiam diris jes ! Ĝis iun tagon... " Sendube ĝi estos bela donaco por infanoj de ĉiuj aĝoj.

## La Trezoro de Karambolo

 j.m.r.h.

---


Duon-duone historio aŭ legendo oni rakontas, ke la tartesa reĝo Argantonio ekluktis por forpeli la fenicojn el Andaluzio. La reĝo kaj lia filo Terion' decidis ataki la plej gravajn fenicajn urbojn situataj ĉirkaŭ la Tartesa Imperio, t.e. Kadizo kaj Seviljo. Sed, profitante ke la tartesoj sendis siajn armeojn lukti en tiuj urboj la fenicoj siafoje atakis Tartesos.

Argantonio vidis la lontan brulegon de sia detruita urbo kaj li decidis rapide reveni por savi ĝin, sed la fenicoj atakis lin. Ĉiuj soldatoj de la armeo de Argantonio mortis, nu ĉiuj escepte unu.



*La masko de Tarteso, laŭ la historiistoj ĝi povus reprezenti la reĝon Argantonio*

La supervivanta soldato forfuĝis por sciigi al Terion' ĉion kio okazis kaj por doni al li la lastajn apartenaĵojn de la reĝo, lia patro, t.e. la reĝaj simboloj kaj la kolringoj.



Oraj juveloj de la Trezoro de Karambolo

Terion´ marŝis por ataki la fenicojn, sed antaŭ tio li gardis ene de kruĉo la trezoro de sia patro. Terion´ luktis kontraŭ la fenicojn kaj li venkis, sed li neniam povis repreni la trezorojn ĉar li mortis dum la kombato.

Preskaŭ tri mil jaroj poste, en la jaro 1958 laboristoj fosis terenon por konstrui kolombo-pafejon, kiam unu el la laboristoj per sia pafilo frapis metalan objekton, kiu unuavide ŝajnis ora brak-bendo. La ceteraj kunuloj daŭrigis la fosadon kaj ili trovis kruĉon enhavanta multaj oraj juveloj.

Unuamomente ili pensis ke tiu aro da juveloj estis nur trompaj falsaĵoj de antikvaĵoj, kaj pro tio la laboristoj ne konsideris grava tiun eltrovon. Tamen post kelke da tempo ili komunikis la eltrovon al la respondeculoj de la konstruaĵo kiu siafoje petis la opinion Juan de Mata Carriazo, unu el la plej gravaj eminentuloj rilate tartesan civilizacion. La verdikto de ĉi tiu fakulo estis tre simpla: la trezoro estis la plej pura, riĉa kaj kompleta reprezentado de la tartesa kulturo. La trezoro trovita, konata ekde tiam kiel la trezoro de Karambolo pro la loko kie ĝi estis, konsistis el 21 juveloj pezantaj entute 2.950 gramojn.



**OFERTO**

de Federico García Lorca, tradukita en  
esperanton de Miguel Fernández.

***SANGA NUPTO***

Eldonita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj  
Hispana Esperanto-Federacio.

Prezo: 5 euroj !!!!!!!

Mendoj: [esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es)

# Pri Lingvistiko

## Mallonga Trarigardo (Unua Parto)

 Andrés Martín González

Lingvistiko konsistas unuavice el ĉiu pervorta esprimo de la homo, ĉu temas pri sovaĝaj popoloj, ĉu pri civilizitaj nacioj kaj prizorgas kaj la perfektan esprimadon pervorte kaj ĉiujn manierojn de pervorta esprimo. Plie, ĉar tre ofte ĉispeca esprimado ne observeblas rekte, la lingvisto atentas skribaĵojn, ĉar ili estas ununuraj rimedoj ebligantaj la konon de la pasintaj kaj la malproksimaj lingvoj.

Lingvistiko tre rilatas al multaj sciencoj liverantaj al –aŭ prenantaj de ĝi donitaĵojn. Iliaj limoj ne estas klaraj. La alportajoj de la Prahistorio, la Etnografio, la Antropologio, la Socia Psikologio, la Fiziologio, la Normiga Gramatiko, ktp, al la Lingvistiko tre gravas por alproksimiĝi kiel eble plej ĝuste al akceptinda interpreto de la lingvo.

Kvankam al esenco de la lingvo ne koincidas kun la sona karaktero de la lingva signo, eblas klarigi la temon ankaŭ el la vidpunkto de la sonoj. La homa esprimado uzas ĉefe sonajn simbolojn, ties skriban tradukon, la gestojn kaj la sintenojn. La anstataŭaj kaj komunikaj funkcioj evoluis pli malsimple ĉe la homo ol ĉe la bestoj. Tio ne dependas de la malsana strukturo de la organoj plenumantaj la esprimon, sed, pli ĝuste, de pli granda perfekteco de la cerba agado de la homo. La signoj faritaj de la bestoj ne prezentas tiom da manieroj ol tiuj de la homoj, la plej perfekta kanto de la birdo estas pli simpla ol la vortoj.

La pervorta esprimado, kiel maniero koni la realon, estis la ĉefa antaŭenpuŝo de la naskiĝo kaj evoluo de la homa civilizacio. Tiel la homoj atingis notindan ŝparon de informado kaj, konsekvence, ampleksan interrilaton kun la ekstera mondo. Samtempe, per ĉispeca esprimado la homo ĝuas pli grandan sendependencon de la mediaj stimuloj enkadrigante ilin en Modelojn senŝanĝajn kaj riĉajn je signifo. Plie, ĉar la pervorta esprimado estas efika rimedo por la interkomunikado satigante la postulojn de ajna rilatspeco, ĝi helpis al la naskiĝo de la socio.

La Lingvistiko bezonis trapasi sinsekvajn fazojn antaŭ rekoni sian aŭtentikan kaj unikan objekton.

Oni ekis organizante tion kio nomiĝis Gramatiko. Ĉi tiu tasko, komencite de la grekoj baziĝas sur la logiko kaj konsideras la lingvon science. La celo de la gramatikistoj konsistis en la farado de reguloj cele al distingo de perfektaj kaj malperfektaj esprimoj. Temis, do, pri normiga gramatiko.



Poste aperis la Filologio. En Aleksandrio estis skolo pri filologio. Tamen, æ tiu termino rilatas pleje al la scienca movado kreita de Friedrich August Wolf (1.777) kaj daŭras. La lingvo ne estas ununura objekto de la Filologio klopodanta limigi, interpreti kaj komenti la tekstojn.

Alia periodo komencis kiam oni malkovris la eblecon kompari la lingvojn. Tio estis la origino de la Kompara Filologio aŭ Kompara Gramatiko. En 1.816 Franz Bopp, en sia verko SISTEMA DE LA KONJUGACIO DE LA SANSKRITA LINGVO studis la rilatojn inter la sanskrita kaj al germana, la greka, la latina, ktp. lingvoj. Antaŭe William Jones okupiĝis pri la temo. Tamen estis Bopp la unua kompreninta la eblecon transformiĝi la rilatoj inter parencaj lingvoj en aŭtonoman sciencon.

# ANDALUZA LITERATURO

(tradukita en esperanton)

## TIU NE KONANTA VIN, AĈETU VIN

de Juan VALERA  
trad. J.M.R.H.

Ni ne povas tion aserti, nur supozi, ke la onklo Kandido (1) naskiĝis kaj loĝis en la urbo Karmono.

Verŝajne la pastro kiu baptis lin ne donis al li la nomon Kandido en la baptejo, male li ricevis la nomon Kandido de tiuj personoj kiuj lin konis, ĉar li estis ekstreme naiva. En neniuj alia loko ĉe la kvar regnoj de Andaluzio estis eble trovi personon pli naiva kaj inocenta.

La onklo Kandido havis tre bonan karateron.

Li estis sindonema, kompatema kaj afabla al ĉiuj. El sia patro li heredis terenon, kelkajn oliv-arbojn kaj dometon en la vilaĝo, li edziĝis sed li ne havis idaron, do li posedis pli ol sufiĉe por vivi.

Ĉar li vivis sate kaj glate li dikiĝis.

Li ofte vizitis sian oliv-arbaron, kiel kavaliro sur belega azeno kiun li havis; sed la onklo Kandido estis tre bona, kaj tre dika, por ne lacigi la azenon kaj por iom ekzerci li kutime piediris kaj post li marŝis la azeno ligita per la kol-brido.



Kelkaj ŝercemaj studentoj vidis lin piedirante kiam li revenis en la vilaĝon. La onklo Kandido marŝis preteratente, do li ne vidis la studentojn.

(1) En la hispana lingvo *Candido* signifas naiva, inocenta.

Unu el ili, konanta la onklon Kandidon kaj lian bonan karakteron, sciigis pri tio al la ceteruloj kaj ĉiuj decidis primoki lin.

Sprita studanto pensis, ke la plej bona ŝerco kaj la plej profitodona estus fripone steli la azenon. La aliuloj aprobis kaj eĉ aplaudis la ideon. Du studentoj silente alproksimiĝis al la azeno, profitante la profundan preteratentemon de la onklo Kandido ili demetis la ligon el la kol-bridon, alia studanto, fama pro sia senhonteco, marŝis post la onklo Kandido preninte la kol-bridon.

Kiam la ceteraj studentoj malaperis, kaj kun ili la azeno, tiu kiu sekvis la onklon Kandido tiris milde la kol-bridon. Tiam la onklo Kandido rigardis malantaŭen kaj li surpriziĝis vidante anstataŭ la azeno studenton.

La studanto diris:

- Estu laŭdata Dio ĉiopova.

- Por ĉiam benata kaj laŭdata, respondis la onklo Kandido.

Kaj la studante diris:

Pardonu min, onklo Kandido, pro la granda ĝeno kiun mi al vi povas kaŭzi sen-vole. Mi estis studanto kverelema, ludema, ĵup-ĉasanta kaj ne tro inteligenta. Mi nenion aprobis. Tagon post tago mi studis malplie. Kolere mia patro malbenis min dirante: Vi estas azeno, do vi devus fariĝi azeno.

Dirite kaj farite. Tuj post tiu malbeno mi ekmarŝis kvarpiede kaj mi vidis aperi voston post mi kaj kreski miajn orelojn. Kvar jarojn mi vivis kiel azeno, ĝis kiam mia patro, pentita pri sia kor-moleco, preĝis al Dio por mi, kaj ĝuste nun, dank'al Dio, mi reprenis mian figuron kaj mian kondiĉon kiel homon.

La onklo Kandido miris pri tiu rakonto, li sentis kompaton pri la studanto, li pardonis la eblajn kaŭzitajn damnojn kaj li permesis al la studanto marŝi apud lia patro kaj tiel atingi la definitivan pardonon.

La studanto adiaŭis la onklon Kandidon kaj li rapide foriris kun larmoj en la okuloj kaj kisante la manon de tiu kiu tiome bonagis al li.

La onklo Kandido revenis hejmen sen azeno sed tre feliĉa pro la grandanima ago plenumita, sed li rakontis nenion pri tio kio okazis ĉar la studanto petegis al li silenti, dirante, ke se oni dissciigis la okazintaĵojn li refariĝus azenon kaj li ne povus studi por esti kuracisto.

Post kelke da tempo okazis la foiro en la apuda vilaĝo Majreno.

La onklo Kandido iris en la foiron por aĉeti azenon. Li alproksimiĝis al vendejo de cigano kiu asertis, ke li havis taŭgan azenon por vendi.

Kia granda surprizo! La onklo Kandido vidis, ke la azeno kiun la cigano deziris vendi estis tiu de la onklo Kandido kiu antaŭe estis studanto. Li pensis:

- Kompatindulo! Anstataŭ studi kaj agadi dece la studento denove friponis, kaj sendube la patro denove malbenis lin kaj duafoje li fariĝis azenon.

Poste li alproksimiĝis al la besto susurante tuj apud la orelo de la azeno frazon kiu ekde tiam sonas kiel refreno:

*Tiu ne konanta vin, aĉetu vin !*

vizitu kaj partoprenu en la ttt-paĝo  
de la andaluza esperanto-movado.

**vizitu kaj partoprenu en la ttt-paĝo  
de la andaluza esperanto-movado.**

[www.esperanto-andalucia.org](http://www.esperanto-andalucia.org)  
**[www.esperanto-andalucia.org](http://www.esperanto-andalucia.org)**

## JUDAJ ŜPUROJ EN JAENO

La unuaj dokumentoj sciigantaj pri ĉeesto de judoj en Jaeno datiĝas de la jaro 612. Ekde tiam kaj dum kelkaj jarcentoj, loĝis judoj en ĉi tiu andaluza urbo sub la regado de la kristanoj kaj poste de la islamoj, alvenintaj en la Iberan Duoninsulon post la jaro 711, ĝis kiam en la jaro 1391 ili suferis grandan persekuton.

Post tiu jaro la judoj en Jaeno devis, vole ne-vole, kristaniĝi kaj loĝi kune en la kvartalo Sankta Kruco. Por lukti kontraŭ ĉi tiuj ne-veraj konvertoj oni kreis en Jaeno en la jaro 1483 la Tribunalo de la Inkvizicio kaj kelkaj jaroj poste, en 1492, la Katolikaj Gereĝoj ordinis la forpelon de ĉiuj judoj en la hispana regno.

Post sep jarcentoj la nuntempa jaena Urbodomo, kun la kunlaboro de kulturaj asocioj kiel tiu nomita *Iuventa*, decidis revalorigi la judan heredaĵon de Jaeno. Komence de la jaro 2005 la jaena Urbodomo petis sian aliĝon al la Reto de hispanaj urboj kun juda kvartalo, reto ankaŭ nomita kiel “La Vojo en Sefaradon”.

Ĝis nun Kordovo estis la ununura urbo kiu estis membro de ĉi tiu grupo de urboj. La reto de jud-kvartaloj en Hispanio estas asocio de urboj kaj vilaĝoj kiuj celas konservi, defendi kaj diskonigi la historian, arkitektan, artan kaj kulturalan heredaĵon de la hispanaj judoj kiuj devige forlasis Hispanion en la jaro 1492.

Apartenas al æ tiu grupo de urboj Barcelono, Caceres, Kordovo, Øirono, Hervas (Caceres), Leon, Oviedo, Ribadavia (Orense), Segovia, Toledo, Tortosa (Tarragona) kaj Tudela (Navarra). Post kelke da tempo, kaj post la redaktado de kompleta informo kiu pruvos la judan historion de kelkaj stratoj en Jaeno, æ tiu andaluza urbo ankaŭ apartenos al æ tiu reto, kio sendube estos alia allogaĵo por turismi en Jaeno.

דרכי ספרד





Hasday Ibn Shaprut (10-a jarcento p.K.),  
sendube la plej fama judo naskiøanta en  
Jaeno.



---

## Paĝoj pri Nia Historio

### *Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio*

#### Ĉu vere la 10-a Andaluza Kongreso de Esperanto?

Kelkaj partoprenantoj en la Andaluza Kongreso de Esperanto okazinta en Sevilo demandis ĉu vere temis pri la 10-a Kongreso de la andaluza esperantistaro. Verdire jes, la andaluzaj geesperantistoj renkontiĝis unuafoje en la jaro 1983 kaj post la fondiĝo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĉi tiu asocio organizis kongresojn en Andaluzio de la jaro 1984 ĝis 1991. Post tiu jaro la kutimo aranĝi ĉi tiujn renkontiĝojn haltiĝas, ĉefe pro la fakto ke kelkaj el la kutimaj organizantoj devis respondecigi pri aliaj aferoj (universitataj studoj, unuaj labor-postenoj, milit-servo, ktp.).

Por sciigi kie kaj kiam okazis la Andaluzaj Kongresoj de Esperanto ĝis nun jen la kompleta listo de ĉi tiuj renkontiĝoj:

<u>Kongreso</u>	<u>Urbo</u>	<u>Jaro</u>
1-a	Kordovo	1983
2-a	Malago	1984
3-a	Sevilo	1985



<u>Kongreso</u>	<u>Urbo</u>	<u>Jaro</u>
4-a	Granado	1986
5-a	Torokso	1987
6-a	Jerezo	1988
7-a	Torokso	1989
8-a	Torokso	1990
9-a	Torokso	1991
10-a	Sevilo	2004

Sed al ĉi tiu listo ni devas antaŭaldoni alian enhavanta la kongresojn okazintaj en la, tiel nomata, unua epoko de la andaluza esepranto-movado. Jen ili:

<u>Kongreso</u>	<u>Urbo</u>	<u>Jaro</u>
1-a	Sevilo	1917
2-a	Sevilo	1918
3-a	Sevilo	1919
4-a	Sevilo	1923

Espereble ĉi tiu bona kutimo renkontiĝi por paroli la internacian lingvon daŭriĝos multe da tempo en Andaluzio.

---

## Informoj pri la 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto

Malago, la 8an kaj 9an de oktobro 2005

### **Antaŭkongreso: 6-an kaj 7-an de oktobro.**

Okazos rapida kurso por interesitoj en la *Centro Cívico*, avenuo Guindos n-ro 48 en Malago. Giorgio Silfer gvidos seminarion por tiuj kiuj volas perfektigi sian scipovon de la lingvo. Giorgio Silfer estas aŭtoro de romanoj, poemoj, teatro-verkoj, libroj pri literaturo kaj interligvistiko kaj ankaŭ aŭtoro aŭ tradukanto de kanzonoj, de 1995 li estras la Kulturan Centron Esperantistan en Svisio.

**Kongreso: 8-an kaj 9-an de oktobro.**

Same ĝi okazos en la *Centro Cívico* de Malago (adreso supre indikita). Estas eble gasti kaj manĝi en la kongresejo, kvankam tio povas certigi nur la la unuaj 50 aliĝontoj. Jen la prezoj:

- Aliĝo al la Kongreso: 10 eŭroj.
- Aliĝo al la Kongreso kaj restado en la kongresejo, inkluzive maten-manĝo, vesper-manĝo kaj nokto-manĝo nur por la 8-a de oktobro: 28 eŭroj.
- Aliĝo al la Kongreso kaj restado en la kongresejo, inkluzive maten-manĝo, vesper-manĝo kaj nokto-manĝo por la tagoj 6-a, 7-a kaj 8-a de oktobro: 60 eŭroj.

Ne-loĝantoj en Andaluzio ne pagos aliĝon al la Kongreso.

Pliajn informojn pri loĝ-eblecoj kaj aliajn aferojn pri la 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto Vi trovos en [www.esperanto-andalucia.org](http://www.esperanto-andalucia.org) aŭ kontaktante kun la Malaga Esperanto-Grupo aŭ kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

***Ĝuu la esperanto-etoson en la sudo de Eŭropo !!!!***

## Flamenko

### KIEL FARTAS NUN LA FLAMENKO?

Nuntempe la flamenko estas plena de fandiĝo, de mestizado kaj de novaj muzikiloj propraj de aliaj muzik-stiloj kiel la ĵazo, la salso, la bosa-novo kaj aliaj etnaj sonoj de diversaj genealogioj kaj geografioj. Ĉi-sence ekzistas pioniraj bandoj kiel *Pata Negra*, *Ketama* kaj *Navajita Plateá*. Ankaŭ estas gravega la kontribuado de ĵazistoj kiel *Jorge Pardo*, *Carlos Benavent* kaj *Chano Domínguez*. Sed kompreneble, la opinioj rilate la taŭgecon de la purismo kaj de la evoluado estas dividitaj.

#### La Gitaro.-


Hodiaŭ la gitaro ludas ĉefan rolon, iuj opinias ke eĉ tro da ĉefroleco. Ĝis la mezo de la pasinta jarcento la gitaro situigis sur dua plano, post la kantisto, tamen nuntempe estas normala afero okazigi koncerton kie nur la gitaro kaj la gitaristo ludas. La plej grava pioniro en ĉi tiu muzikilo estis *Paco de Lucía*, verŝajne la flamenka artisto kiu atingis la plej altan rangon en la flamenka mondo. Li kreis skolon al kiu ankaŭ apartenas aliaj flamenk-gitaristoj kiel *Tomatito* kaj *Vicente Amigo*.



Kovrilo de la lasta disko de la kordova Vicente Amigo.

#### La Dancado.-

*Matilde Coral* diris, ke la tekniko venkis la arton en la nuntempa flamenko. Eble pro tio oni diras, ke la aktualaj flamenkaj dancistoj perdis iom da profundeco. Dancistoj kiel *Antonio Canales*, *Joaquín Cortes* kaj *Sara Baras* enirigis en sian dancadon novajn elementojn. Kaj vere ili triumfas sur la scenejoj naciaj kaj internaciaj. Alia grupo ankoraŭ sekvas la ortodoksan stilon kiel *Javier Barón*, *El Mistela*, *Joselito Fernández* kaj *Farruquito*.



Sara Baras  
la plej grava dancistino de  
la nova flamenko.

### La Kantado.-

Denove multaj fakuloj pri la flamenka arto pensas, ke la deziroj renovigi la flamenkon ofte provokas la perdon de la aŭtentika spirito, kiu nuntempe estas pli komerca arto. Tamen eble ĉi tiu nova spirito alproksimigis la flamenkon al la junularo. Sendube la plej gravaj artistoj ĉi-sence estis *Camarón de la Isla* kaj *Enrique Morente*. *Camarón* renkontigis muzikajn elementojn de aliaj stiloj kiel la roko, la salso aŭ eĉ la popo kaj utiligis muzikilojn ne normalaj en la flamenko kiel la drumo.

Sed sendube estas *Enrique Morente* la plej grava figuro de tio nomita “nova flamenko” aŭ “juna flamenko” kaj tio malgraŭ la fakto ke *Enrique Morente* jam sesdekjaraĝas.



Enrique Morente, la forto de la  
nova flamenko.

KONTAKT-ADRESOJ de la Esperanto-Movado en Andaluzio:

- **En Malago:** Esperanto-Grupo “Suna Marbordo”  
malaga@esperanto-andalucia.org
- **En Sevilo:** Sevilja Esperanto-Asocio  
sevilla@esperanto-andalucia.org
- **En Kordovo:** Asociación Cordobesa de Esperanto  
cordoba@esperanto-andalucia.org
- **En Jaeno:** Jaena Esperanto-Asocio                      jaen@esperanto-  
andalucia.org
- **En Onubo:** Onuba Esperanto-Asocio                      huelva@esperanto-  
andalucia.org

**KAJ EN LA TUTA ANDALUZIO** andalucia@esperanto-andalucia.org

## Poezia Angulo



### KROM VIA VENTRO

Krom via ventro  
ĉio konfuzas.

Krom via ventro  
ĉio futuras  
nedaŭre, stepe  
paseas, nubas.

Krom via ventro  
ĉio kaŝkuŝas,  
krom via ventro  
ĉio last-fluas,  
polvo sen mondo,  
polv' neseкура.

Krom via ventro  
ĉio obskuras,  
krom via ventro  
klara profunda.

MIGUEL HERNÁNDEZ  
(1910 - 1942)

*Tradukis:*

Miguel Fernández

En sia libro "Miguel Hernández, Poeto de l'popolo. Poem-Antologio".

### LASTA KANTO

Farbita, ne malplena:  
Farbitas mia hejmo  
per la kolor' de l' grandaj  
pasioj kaj mizeroj.

Ĝi, kunprenite plore,  
el la plorad' revenos  
dezerta l'manĝo-tablon,  
Ruina la kuŝejon.

La amo-kisoj floras  
sur niaj lit-kusenoj.  
Kaj, nokte, ĉirkaŭkorpe  
El la lit-tukaj centroj  
intensa konvolvulo  
aroma ĉirkaŭkreskos.

Malam' sin atenuas  
Jam transe de l'fenestro.

Ĝi iĝos milda krifo.

Min lasu en espero.

## ANDALUZA KUIRARTO

### **La Pipirano**

La pipirano estas tipa manĝaĵo en la orienta parto de Andaluzio kaj pli konkrete en la provincoj Jaeno kaj Granada. Temas pri salato farita kun kapsikoj, tomatoj, cepo, kukumo, tuno kaj muruo. Dum la varma somero estas tipa kaj ege bongusta la pipirano farita kiel gazpaĉo.

#### Jen la ingredientoj:

- \* 4 tomatoj.
- \* 2 kukumoj.
- \* 1 verda kapsiko.
- \* 1 cepo.
- \* 2 ajleroj.
- \* Oliv-oleo.
- \* Akvo.
- \* Salo
- \* Origano



#### Jen la farado:

Tranĉu laŭ malgrandaj pecoj la kukumojn, la cepon, la tomatojn kaj la kapsiko. Pistu la ajlerojn miksitaĵ kun la origano. Miksigu ĉion. Verŝu la tutajon en akvon kaj aldonu oliv-oleon kaj salon laŭ via plaĉo.

**Bonan Apetiton !**

## Turismi en .... *LORA DEL RÍO*

La abundo da arkeologiaj restaĵoj en la zono nomata *Setefilla* pravas, ke komence de la Bronza Epoko jam ekzistis tie tartesa setlejo. Ĉirkaŭ la jaro 1.700 a.K. ekzistis apud la nuntempa Lora del Río ibera vilaĝo. Fine de la 3-a jarcento a.K. la romianoj sidiĝas en ĉi tiu zono ricevanta la nomon *Axati* (pr. Aksati) kies enloĝantoj dediĉis sin havigi oliv-oleon al Romo. La imperiestro Vespasiano eĉ donis al *Axati* la titolon *Municipum Flovium*.

Ne ekzistas multaj datumoj pri la visigota konkero de la urbo, tamen oni supozas, ke de tiu epoko venas la nomo *Lora*, devenanta de la vorto Laŭro, por la abundo da ĉi tiu arbo en la zono. La araboj nomis ĝin *Lawro* kaj ĝi estis la plej grava defenda centro ekzistanta inter la tiamaj *Isbiliya* (Sevilo) kaj *Qurtuba* (Kordovo).



Blazono de LORA DEL RÍO

Meze de la 13-a jarcento la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon kaj li tuj donacis ĝin al la Milit-ordeno de Sankta Johano de Jerusalemo, ankaŭ konata kiel Ordeno de Malto.





Tipa strato de Lora del Río en la sevila provinco.

La plej ora epoko de Lora del Río okazis dum la 18-a jarcento, tiam oni starigis grandajn konstruaĵojn kiel la Urbodomo, la Preĝejo de Nia Patro Jesuo kaj ankaŭ nobelaj palacoj, kiel tiuj de la familio Montalbo kaj la tiel konata Domo de la Leonoj.

Dum la 19-a jarcento en Lora del Río videblas grandaj ŝanĝoj kiuj ebligis la aperon de la urbo tiel kiel hodiaŭ ĝi estas konata, tio estas, grava terkultura zono bazita sur la irigacia kultivado.

### Ĉefaj Vidindaĵoj

La Urbodomo estas baroka konstruaĵo starigita dum la 18-a jarcento, ĝi estas klara ekzemplo de la tipa andaluzia arkitektura skolo de tiu epoko.



Urbodomo de Lora del Río

La Domo de la Leonoj oni starigis ankaŭ dum la 18-a jarcento, ĝi estis la sidejo de nobela familio, kies blazono videblas sur la enir-pordo de la palaco. Oni konstruis ĝin laŭ la baroka stilo.



Domo de la Leonoj

La merkaton oni konstruis komence de la 20-a jarcento sub la gvidado de la fama sevila arkitekto Anibal González, ĝi estas bela montrilo de la tipaj regionaj andaluzaj konstruaĵoj de la komenco de la pasinta jarcento.



La Merkato de Lora del Río

### Ĉefaj Festoj:

Kiel en ĉiuj andaluzaj vilaĝoj ankaŭ en Lora del Río oni devas elstari la Paskon. La loka foiro komenciĝas la lastan ĵaŭdon de la monato majo. Sed sendube la plej grava festo okazas la 8-a de septembro honore al la Virgulino Setefilla.

Tipaj Manĝaĵoj:

- *Gachas con coscurros:*

pasto farita kun lakto, faruno, sukero, cinamo kaj anizo.

- *Sopeaos:*

tipa loka gazpaĉo farita kun pano, kukumo, cepo, tomato, pomo kaj kapsikoj.

- *Gañotes:*

bongustaj dolĉaĵoj speciale faritaj dum Pasko.

## MISTEROJ KAJ LEGENDOJ DE NDALUZIO



j.m.r.h.

### ***La stranga historio de la Farmo-Domo Jurado***

Je mallonga distanco de Malago stariĝas la farmo-domo Jurado. Oni konstruis ĝin antaŭ 200 jaroj sed ne kiel ripozejo, sed male kiel centro por produkt-bieno de la plej riĉa malaga familio, la familio Heredia. La legendoj rakontas, ke kelkaj membroj de tiu familio, kune kun aliaj personoj, ralisigis demonajn ritojn en la farmo-domo dum kiuj ili buĉis junulinojn en la kapelo de la domo aŭ en kelka sekreta ĉambro.

Kompreneble ĉi historio povas esti nur legendo aŭ simpla diraĵo ekzistanta en la ĉirkaŭaĵoj, tamen tio kio ja estas tute certa estas la fakto, ke kvin junulinoj aperis murditaj en tiu epoko trans la rivero kiu fluas apud la farmo-domo ĉiam tri tagoj post la malaperoj.

Hodiaŭ la farmo-domo estas senhoma konstruaĵo kiu dumnokte aperas kiel fantoma loko, eble pro sia ruina stato, kvankam en la jaro 2002 la nuntema posedanto de la farmo-domo, malaga turisma entreprenisto, prezentis projekton por konstrui ĝuste tie hotelon kaj golfo-terenon.

La farmo-domo havas 365 fenestrojn, malgraŭ ĉi tiu simbola nombro ne aperas en la tuta konstruaĵo pliaj simboloj kiuj povas pensigi nin, ke la familio kiu ordonis konstrui la domon sekvis strangajn ritojn.

Multaj personoj asertas, ke dumnokte estas videblaj strangaj lumoj en la ruina farmo-domo kaj ankaŭ ekzistas personoj asertantaj, ke estas eble aŭskulti strangajn bruojn. Parapsikologiaj fakuloj vizitas ofte la farmo-domon kaj kelkaj el ili diris, ke oni povis aŭskulti virinajn voĉojn help-petantaj kaj eĉ vidi virinajn figurojn.

Kompreneble ĉi tiuj aferoj ne povas esti certigitaj, tamen la legendo ekzistas.



La farmo-domo Jurado apud Malago

## FAKAJ ASOCIOJ

Temas pri tiuj organizoj kiuj renkontigas siajn membrojn laŭ diversaj profesioj, mondkonceptoj, ŝatokupoj, ktp. Ni prezentas sube kelkajn el la plej gravaj kune kun la adreskontaktoj, eble al Vi interesas kontakti kun iu el ili.

**Kultura Agado.** Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj.  
Vinko Oslak. Orelweg 20 AT-9020 Klagenfurt / Celovec, Aŭstrio.  
www.osiek.org      Organo: *La Gazeto*

**Kvakerismo.** Kvakera Esperanto-Societo.  
23, Knockgrennan Ave. Omagh. Nord-Irlando BT79 OEB Britio.  
inform@esperanto.no

**Laborismo.**  
Sennacieca Asocio Tutmonda.  
67 Avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio  
www.sat-esperanto.org      Organoj: *Sennaciulo* ; *Sennacieca Revuo*

**Martinus-Kosmologio**  
Martinus Instituto  
Mariendalsvej 94-95 DK-2000 Frederiksberg.  
www.martinus.dk

**Matematiko**  
Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj  
Hufelandstr. 31 DE-10407 Berlin (Germanio)  
www.geocities.com/matematikistoj      Organo: *La matematikisto*

**Medicinistoj**  
Universala Medicina Esperanto-Asocio  
D-ro Sakutaro Tadokoro, 2-16 3 Mikawa-tyo, Maebasi-si, 371-0015  
Japanio      tt.esperanto.org/umea      Organo: *Medicina Internacia Revuo*

**Mensa**  
Espermenso  
Marvin H. Stanley, Postbus 25142 NL-3001 HC Rotterdam (Nederlando)  
marvin@co.uea.org

### **Mondcivitanismo**

Esperantista Internacia Centro de la Civitanoj de la Mondo  
G. Charpentier, 32 C, rue J. Perrin, FR-77190 Dammarie-lès-Lys  
(Francio)

### **Motorciklismo**

Esperantista Motorciklanta Ĉeno  
S-ro André Rambeaux, 27 La Fagne de Chimay, BE-6460 Chimay (Belgio).  
emcx@skynet.be

### **Muziko**

Muzika Esperanto-Ligo  
Organo : *Muziko*

### **Rok´**

Esperanto-Rok-Asocio EUROKKA  
FR-31450 Donneville (Francio)  
eurokka@club-internet.fr Organo: *Rok-Gazeto´*

### **Naturamikoj**

Esperanto-Fako de la Naturamika Internacio  
Antje Noordewier, Emmalaan 7, NL-3832 AH Leusden (Nederlando)  
Eric.baert@swing.be Organo: *La Migranto*

### **Naturismo**

Internacia Naturista Organizo Esperantista  
S-ro Jozefo Németh, Fő u. 41/5 HU-8531 Ihász (Hungario)  
jozefo@mail.globonet.hu Organo: *Naturista Vivo*

### **Naturkuracado**

Internacia Naturkuraca Asocio  
Kwangmyong 2 dong 50-5ho Kwangmyong-shi, Kyongki-do (Korea  
Respubliko) www.esp-ina.com Organo: *Naturkuracado*

### **Nefumismo**

Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj  
Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk (Nederlando)  
br.esperanto@planet.nl Organo: *Puraj Pulmoj*

### **Nifologio**

Asocio pri Nifologio (NIFO = Ne-Identigitaj Flugantaj Objektoj)  
Ailton Luis da Silva, Rua Inverno 12, Grama, Paraíba do Sul  
RJ, BR 25850-00 Brazilo octavioaraibolt@hotmail.com

### **Oomoto**

Esperanto-Propaganda Asocio  
Ten'on-kyô, Kameoka-si Kyôto-hu, 621-8686 (Japanio)  
esperanto@oomoto.or.jp Organo: *Nova Vojo*

### **Ortodoksa Kristanismo**

Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista  
Prof. Bojidar Leonov p.k. 44 BG-4300 Karlovo (Bulgario)  
leonov@rozagv.com

### **Paco**

Mondpaca Esperantista Movado  
Claude Glady, rue de la Marne 36, E-1030 Bruxelles (Belgio)  
cglady@arcadis.be

### **Poŝto kaj Telemokunikado**

Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio  
P.K. 25 BG-1000 Sofia (Bulgario) Organo: *Interligilo*

### **Radioamatoroj**

Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj  
S-ro Lenio Marobin, 60 Tudor Court, London (Britio)  
marobin@btclick.com Organo: *ILERA-Bulteno*

### **Religi-komparado**

Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj  
S-ro Christian Lavarenne, "Le Presbytère », FR-09800 Balagué (Francio)  
chlavarenne@freesur.fr

### **Rotario**

Rotaria Amikaro de Esperantistoj  
S-ro Marc Levin, 30 rue de Lattre de Tassigny, FR-69009 Lyon (Francio)  
levin.marc@wanadoo.fr

### **Samseksamo**

Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj  
S-ro Rolf Köhler, Bergstr. 78, DE-01069 Dresden (Germanio)  
lasekretario@gmx.net Organo: *Forumo*

### **Scienco**

Internacia Scienca Asocio Esperantista

ISAE-Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269 Eschwege (Germanio)  
IsaeSachs@aol.com Organo: *Scienca Revuo*

Ne forgesu aboni Vian kotizon por la kuranta jaro 2005 (kaj tiun de la jaro 2004 se Vi tion ankoraŭ ne faris). La aliĝ-kotizo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kostas 15 eŭrojn, se Vi jam kotizas en unu el la lokaj andaluzaj kluboj bv. kontakti kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Uzu unu el la jenaj banko-kontoj:

- BBVA: 0182 4106 71 0207160717

- Caja General de Ahorros de Granada: 2031 0225 54 0100187657

Bv. post pagi Vian jaran kotizon ne forgesi sciigi al la asocio pri Via pago. Uzu por tiu informo nian adreson en Malago, en Kordovo aŭ nian elektronikan adreson.

Ni pardonpetas pro la malfrua apero de la n-ro 76 de nia revuo. Espereble dum la somero aperos la numeroj 77 kaj 78. La numero 79 de *Gazeto Andaluzia* estos samtempe la kongreslibro de la 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto, okazonta en Malago la venontajn 8-an kaj 9-an de oktobro.

Viajn kontribuaĵojn, opiniojn, sugestojn, kritikojn, kion ajn. bv. sendi al nia adreso:

GAZETO ANDALUZIA, Apartado de Correos 3142, 14080 Córdoba  
esperanto1@supercable.es

Vizitu en Interreto la jenajn paĝojn:

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo: [www.esperanto-andalucia.org](http://www.esperanto-andalucia.org)

Kordova Esperanto-Asocio: [es.geocities.com/esperantocordoba](http://es.geocities.com/esperantocordoba)

Jaena Esperanto-Asocio: [www.esperanto-jaen.tk](http://www.esperanto-jaen.tk)

Sevilja Esperanto-Asocio: [www.sevilo.tk](http://www.sevilo.tk)

Onuba Esperanto-Asocio: <http://groups.msn.com/EsperantoenOnubo>



## **Andaluzia Esperanto-Unuiĝo Asociación Andaluza de Esperanto**



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.  
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

### Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López  
Vic-Prezidanto: Rafael Sepúlveda Bernal  
Sekretario: David Rodríguez García  
Kasisto: Julio Herrero Segura  
Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj:   aarquillos@lycos.es  
                  esperanto14@supercable.es

TTT-paĝo: [www.esperanto-andalucia.org](http://www.esperanto-andalucia.org)

### Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio  
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)  
[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

\* Hispana Esperanto-Federacio  
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)  
[admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)



## Zeĝelo

Metrika popola versformo devenanta verŝajne el la moaŝaho, kaj eble, perfektigita de la intelektulo Abu Bakr Muhammad ibn Bayya.

Laŭ Antonio MARCO BOTELLA el sia libro *Lirikaj Perioj de Al-Andalus* paĝo 319a.

Skribas Antonio MARCO en sia prestiĝa libro pri la literaturo en Al-Andaluso, ke la vorto *zeĝelo* devenas el la araba *zayal* signifanta "bruo, brua ĝojo". Diras Antonio MARCO, ke kutime oni skribis ĝin en la romanca lingvo. Ĝi konsistas el tri partoj: la unua, kun almenaŭ du versoj unurimaj, ripetataj periodo en la poemo; la dua, ŝanĝo kvarversa, el kiuj la tri unuaj asonancas kaj la kvara rimiĝas kun la parto unua kaj rekondukas al ĝia ripeto. Tute adekvata por la kanto, oni povas percepti tiun versformon en la lirikaj komencoj de diversaj beletroj.

ESPERANT-LINGVAJ VORTOJ KIUJ, HISTORIE AŬ  
ETIMOLOGIE, DEVENAS DE ANDALUZIO